


STARTO

N-ro 1/2022 (282)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Pardubice – nia ĉi-jara kongresejo

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencioj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio:

Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/
www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy
www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/
www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

PRI INDIĜENAJ LINGVOJ EN MONTREALO: FETTES REĜISOROS LA TEMON DE LA 107-A UK

Fine de januaro 2022, eksprezidanto de UEA kaj profesoro pri edukado d-ro Mark Fettes akceptis reĝisori la kongresan temon de la 107-a Universala Kongreso en Montrealo. Mem kanadano, Fettes esploras kaj verkas pri lingvopolitikaj kaj edukaj aspektoj de indiĝenaj lingvoj jam de tridek jaroj. Li posedas ankaŭ sperton kiel kongrestema reĝisoro: en Tampere, Finnlando, en 1995 li gvidis la kongresajn diskutojn pri la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

La temon de Montrealo inspiris la decido de UN plukonstrui sur la spertoj de 2019, la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, per dekjara komuna strebado. Per la temformulo “**Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj**” UEA inaŭguras sian propran kontribuon al la Jardeko (2022-2032). Unuflanke, temas pri grava aspekto de la lingvaj rajtoj: simile kiel esperantistoj kontraŭas la altrudon de la lingvoj de pli grandaj aŭ fortaj popoloj al aliaj malpli fortaj, ili ankaŭ emas subteni la strebojn de diversaj popoloj por revalorigi kaj plu disvolvi siajn proprajn lingvojn. Sed ekzistas ankaŭ dua, grava flanko de la temo: la kontribuo de indiĝenaj lingvoj al nia kompreno pri daŭripova evoluigo kaj la repaciĝo de homaj rilatoj kun la Tero.

“En Montrealo niaj kongresanoj havos okazon kleriĝi pri unuopaj, fascinaj lingvoj kiel la inuka, la aniŝnaba aŭ la kanjenka, kaj ankaŭ lerni iom pri la enkadriĝo de indiĝenaj lingvoj en la kompleksa lingvopolitika pejzaĝo de Kanado,” Fettes klarigas en sia enkonduka prezento de la temo por la revuo *Espe-*

ranto. “Sed ni ankaŭ rigardos freŝan tradukon de la Deklaracio pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj, diskutos pri la signifo de indiĝenaj lingvoj por la Celoj por Daŭripova Evoluigo, kaj konsideros, kion diras nuntempaj indiĝenaj verkistoj kaj pensuloj pri la evoluo de homaj socioj.”

UEA nun serĉas homojn, kiuj ŝatus kunlabori kun Fettes en la organizado de la Montreala programo. Bonvenas sinproponoj de tiuj, kiuj ŝatus organizi unuopajn sesiojn aŭ helpi kunordigi la tuton, kaj ankaŭ de tiuj, kiuj ŝatus kontribui per specialaj scioj pri iu parto de la vasta demandaro levita de la temo. Fettes substrekas, ke ne necesas esti specialisto por aktive kontribui. “Mi ŝatus trovi kunlaborantojn kun entuziasmo pri la ‘popolkleriga’ aspekto de la temo, eble homojn kun ĝenerala interesiĝo pri mondaj temoj kiel homaj rajtoj, evoluigo, daŭripovo kaj simile, aldone al la fakuloj kiuj povus prelegi aŭ gvidi diskutojn pri specifaj aspektoj.

TROMPO-PROVOJ PER ESPERANTO

UEA konstatis amasiĝon de retaj trompo-provoj uzantaj Esperanton. La trompo-provoj plej ofte okazas per retoj kaj trompisto per sufiĉe konvinka Esperanto celas akiri informojn kaj monon de nesuspektemaj homoj. La plej oftaj mesaĝoj estas tiuj de homo, kutime vidvino, suferanta pro malsano, kiu bezonas lasi al heredonto grandan sumon por uzado por sociaj bonfaraj celoj. Aŭ usonaj soldatoj aŭ soldatinoj, kiuj, estante for en iu alia lando, volas amikiĝi.

Laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

**POZVÁNKA NA ČLENSKOU
SCHŮZI ČESKÉHO
ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s.
(ČES),**

kteřá se koná v jídelně Domova mládeže
a školní jídelny Pardubice, budova C,
Gorkého 350
v PARDUBICÍCH
dne 17. 9. 2022 od 9 hodin.

Program:

Zahájení, přivítání hostů, prezentace,
kontrola usnášeníschopnosti, volba
orgánů členské schůze (3-5členného
předsednictva, zapisovatele a
ověřovatelů zápisu)
Zpráva o hospodaření ČES
Zpráva o činnosti ČES a jejích
organizačních složek
Volby nového výboru pro funkční
období 2022-2025
Diskuze ke zprávám o hospodaření a
činnosti ČES
Různé
Usnesení
Závěr

V Bohutíně dne 10.3.2022
Mgr. Libuše Hýblová,
předsedkyně ČES, z.s.

**Program sjezdu ČES,
Pardubice 16.-18. 9. 2022**
bude doplněn později a stejně tak i
příhláška.

**UEA vendas sian domon
en Roterdamo**

UEA post siaj sidejoj en Ĝenevo kaj Londono ekde 1955 establis sian sidejon en Roterdamo, sed nun, post 66 jaroj, ĝi finas sian aktivadon. La libroservo transiros al E@I en Slovakio kaj biblioteko al la Nacia Biblioteko de Aŭstrio en Vieno, kie troviĝas Esperanto-kolekto.

La Roterdama domo en la strato Nieuwe Binnenweg estis montrofenestro de nia movado. En la teretaĝo bela librovendejo, kie la preterpasantoj povis vidi juvelojn de nia literaturo. Supre kancelarioj kun Hodler-biblioteko ĉe la muroj aranĝita interese: laŭ eldonjaroj. En la subtegmento ĉambro por trankvilito de volontuloj, en la teretaĝo malantaŭ la librovendejo saloneto kaj prelegejo. Almenaŭ tiel mi memoras la domon, kiam mi vizitis ĝin en 1991.

La Komitato de UEA decidis vendi la domon, ĉar la asocio ne plu kapablas financi ĝin. Novaj energi-normoj postulas gravajn rekonstruojn kaj ankaŭ laborkostoj superas la eblojn de nia asocio.

La asocio tamen restas en Roterdamo jure.



foto Joost Witteveen – Flickr, Vikipedio

Centra Oficejo de UEA en Roterdamo

73-a IFEF-kongreso en Beroun 6 – 11 majo 2022

La ĉi-jaran tutmondan kongreson de fervojistoj-esperantistoj gastigos la urbo Beroun.



La **programo** proponas prelegon pri Beroun kaj trarigardon de la historia parto de la urbo, koncertojn (Noproblem, Black buĥinos), atelieron de manlaboroj, E-kurson, terminologian sekcion, eku-menan diservon kun orgena koncerto, tuttagan ekskurson (Křivoklát, Lužná), nacian vesperon, duontagan ekskurson al Nižbor aŭ Praha, komunan vesperon kun bufedo, prezenton de la 74-a kongreso 2023. Kongresa kotizo 1500 Kč. Loĝado, manĝo, ekskursoj pagendaj memstare.

Eblas ankaŭ partopreni postkongreson en Pardubice kun ekskursoj al Litomyšl, Svitavy, Hradec Králové.

Adreso de LKK: Český železničářský esperantský svaz, Bratří Hubálků 161, 560 02 Česká Třebová, ČR. tel., +420 602483265; kongreso@atlas.cz, <http://kongreso.wz.cz/>

La esperantistoj havas propran sanktulon!

La 4-an de marto 2022 en Vatikano papo Francisko prezidis la Publikan ordinaran konsistorion por la proklamo de dekretoj por tri novaj sanktuloj:

- beata Titus Brandsma, sacerdoto, karmelano, martiro
- beata Maria Rivier, fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj de la Entempligo de Maria
- beata Maria di Gesù (Carolina Santocanale), fondantino de la Kongregacio de la fratulinoj kapucenaj de la Dipatrino de Lurdo

La solena sanktproklamo okazos je la 5-a Paska dimanĉo, la 15-a de majo 2022.

Ni, membroj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista aparte ĝojas, ke inter la novaj sanktuloj troviĝas la nomo de nia membro kaj nia ĉiela patrono, Titus Brandsma! Li estas la unua Esperantisto kiu iĝis sanktulo!



Titus Brandsma (Anno Sjoerd Brandsma) naskiĝis la 23-an de februaro 1881 en Ugo-klooster apud Bolsward kaj martire mortis la 26-an de julio 1942 en la


koncentrejo Dachau. Li estis frisa karmelana patro, katolika sacerdoto, profesoro pri filozofio, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto, kontraŭnaziulo kaj esperantisto. En *Espero Katolika* 11/1985 per la teksto "La moderna martiro Tito Brandsma estis Esperantisto" oni mallonge skizas la vivon de p. Titus.

*Marija Belošević,
prezidantino de IKUE*

Novajoj de KAVA-PECH

En Starto 3/2021 (p. 92-93) mi informis pri la novaĵoj: la tria eldono de *Home en senhomeco* de Martin Stuppniĝ (la unua solide bindita) kaj dulingva (en la germana originalo kaj Esperanto-traduko de H. M. Maitzen) *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado* de Ludwig Boltzmann. Plie mi jam anoncis la preparatajn novaĵojn: *Manon Lescaut* de Vítězslav Nezval en la traduko de Jiří Kořínek kaj ĉeĥan version de mia libro *Ĉinio, Korea, Japanio, země podobné, avšak rozdílné*.

La informon pri *Manon Lescaut* mi kompletigu, ke post la propra teksto de Nezval estas aldonita la postparolo *Surscenigo de la dramo Manon Lescaut* verkita de Vlastimil Kočvara. En ĝi li priskribas la historion de la prezento de la dramo fare de profesiaj aktoroj de Silezia Teatro en Opava, kaj en sia propra opava scenejo, kaj en la festivalo de Esperanto-teatroj en Pula (tiam Jugoslavio) en la jaro 1968. Li priskribas ankaŭ plurajn esperplenajn projektojn rilate al la utiligo de la dramo, sed ilin haltigis la soveta invado en tiujara aŭgusto.




La unua ĉi-jara eldonaĵo de KAVA-PECH estis en la angla, tamen strikte ligita al Esperanto kaj ĝia kreinto L. L. Zamenhof. Temas pri la studo de Christer O. Kiselman *Zamenhof's Yiddish Grammar and his Universal Language: Two projects in Ashkenazi Culture*.

Dum jarcentoj judoj en Rusio vivis kun pluraj lingvoj: la propraj jida, la hebrea

kaj la aramea, same kiel la rusa de la imperio, kiu estis uzata en ĉiuj lernejoj kaj universitatoj. Multaj aliaj lingvoj ĉirkaŭis ilin, inter kiuj estis la litova, la pola kaj la belorusa.

En tiu lingve riĉega regiono naskiĝis lingvaj reformoj kaj lingva kreemo. Meze de tiu intense aktiva kultura ĉirkaŭaĵo Zamenhof kreis kvar lingvojn kaj verkis detalan gramatikon de sia patrina lingvo, jido.

En tiu ĉi libro la verkinto prezentas kaj analizas la jido-gramatikon de Zamenhof same kiel lian duan artefaritan lingvon, Lingvo universala. Komparo montras ke la influo de jido sur Lingvo universala estas pli forta ol la influo de jido sur esperanto, la kvara lingvo de Zamenhof.



Plia ĉi-jare eldonita libro estis iom surprize la Esperanto-versio de mia libro, *Ĉinio, Koreio, Japanio: Landoj similaj sed diferencaj*. Surprize por tiuj, kiuj legis, ke pro la alta kosto de tiuj plenkoloraj libroj en pinta kvalito mi devos atendi kun la eldono de la Eo-versio ĝis revenos sufiĉa parto de la mono enigita en la ĉeĥan eldonon.

Tamen, post tiu sciigo alparolis min anonimulo kun la oferto donaci 30 000 kronojn por subteni la Eo-eldonon. Tio estis precize tiom, kiom mankis por la realigo, do mi jam povis eldoni ankaŭ la Eo-version.

Momente mi preparas du novajn eldonaĵojn, ambaŭ nigroblankajn kaj multe malpli ampleksajn, do mi esperas (sed ne certas) aperigi ilin antaŭ la solenaĵo de 30 jaroj de la eldonejo KAVA-PECH la 9-an de junio ĉi-jara.

La unua estas la lasta nefinita verko de Jules Verne *Afrika misio*, kiun tradukis Jidřiška Drahotová en la ĉeĥan laŭ la Eo-traduko de István Ertl, kun ĉarmaj ilustraĵoj de Mirka Tomečková.

La dua estas Esperanto-originalo de Ágnes Ráczkevy-Eötvös *Atributoj de apostoloj kaj evangeliistoj*.

La tria preparata libro estas momente pli revo ol reala plano, ĉar estas problemoj kun kopirajto, do mi planas ĝin eldoni (se eblos) komence de la jaro 2023. Temas pri mondkonata romano de Karl Bruckner tradukita en pli ol 70 lingvojn *Sadako volas vivi* en la traduko de Jan Duda. Temas pri la vivopriskribo de japana knabino el Hiroŝima, kiu sekve de radiado post la falo de atombombo malrapide mortadas pro kancero malgraŭ la strebo de multaj knabinoj helpi al ŝi per kunmetado de origami en la formo de grupoj.

Petr Chrdle

Rimarkigo: Lingvoprojektoj de Zamenhof

- 1 *Lingwe uniwersala* (1878)
- 2 *Lingvo universala* (1881)
- 3 *La Mondo Lingo* (1886)
- 4 *Lingvo internacia* (1887)
- 5 *A language for Hillelists* (1901 planata, sed nerealigita projekto)



POZVÁNKA



na oslavu 30 let nakladatelství KAVA-PECH

spojenou s veřejným křtem nově vydaných slovníků
a dalších knih vydaných v coronavirové době
ve spolupráci s Jednotou tlumočníků a překladatelů


V budově sídla JTP, Senovážné náměstí 23, sál č. 16

ve čtvrtek 9. 6. 2022 od 17:00 hodin



Velký esperantsko-český slovník

Autor: Miroslav Malovec,
760 stran, 145 x 205 mm
Dosud nejpobsaženější vydání česko-esperantského slovníku. Obsahuje cca 24 000 hesel a 23 000 odvozenin, v menším rozsahu i příklady použití a frazeologii.



Latinsko-český kapesní slovník (2. vyd.)


Autoři: Jiří A. Čepelák a Hans H. Orberg, 79 stran, 10x14,5 cm
Přes 1800 nejfrekventovanějších slov a slovních spojení. 2. vydání doplněno o vysvětlení výslovnosti a úvod do latinského tvarosloví.



Čína, Korea, Japonsko: Země podobné avšak rozdílné

Autor: Petr Chrdle,
247 stran, 17 x 24 cm
Zážitky z uvedených zemí doplněné mnohými barevnými obrázky autora pořizovanými během cest, mj. na univerzitách a náboženských centrech.

Součástí bude prodejní výstava knih z nakladatelství KAVA-PECH (již od 16:00 hodin) s příležitostními slevami.
Hudební vložka a přípitek se skromným pohoštěním.



**Výsledek hospodaření ČES za rok 2021, plán na rok 2022
a přehled o majetku, pohledávkách a závazcích (v Kč).**

Příjmy	pl.2021	sk.2021	pl.2022		
Příspěvky na běžný rok	13 000	16 820	13 000	Přehled o majetku, pohledávkách a závazcích k 31.12.2021	
				peněžní prostředky	
Příspěvky na budoucí rok	15 000	17 841	17 000	pokladna korunová	1 230
Dary členů	10 000	9 424	10 000	pokladna eurová	0
Dary nečlenů		0		ceniny	0
Dotace		0		účet Fio	700
Starto předplatné		787		účet Fio spořicí	480 848
Konference a sjezdy	50 000	55 750	80 000	peníze celkem	482 778
Činnost klubů a sekcí bez PS		0		<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>-10 874</i>
Muzeum		0		investice	
Libroservo	6 000	13 416	19 000	podílové listy	168 489
Kurzy esperanta	2 000	1 120	2 000	investice celkem	168 489
Příspěvky UEA ind. běžný rok		6 267		<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>-7 992</i>
Příspěvky UEA ind. bud. rok		17 431		pohledávky	
Platby UK na běžný rok		3 412		UEA subkonto	30 625
Platby UK na budoucí rok		3 815		pohledávky celkem	30 625
Platby ILEI a pedagog. komise	900	2 440		<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>1 327</i>
Úroky z účtů	200	250	200	ostatní majetek ČES	
Virtuální adresa	200	0	200	drobný majetek v ceně pořízení	209 894
				knihy v libroservu (inventura)	124 659
				ostatní majetek ČES celkem	334 553
Příjmy celkem	97 300	148 773	141 400	<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>-46 001</i>
				závazky	
Výdaje	pl.2021	sk.2021	pl.2022	UEA subkonto	0
Starto tisk	20 000	19 788	20 000	platby pro UEA	23 496
Starto distribuce	16 000	17 594	17 000	závazky k členům	0
Konference a sjezdy	50 000	65 676	80 000	závazky celkem	23 496
Činnost klubů a sekcí bez PS	5 000	0	5 000	<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>-14 534</i>
Provoz ČES, internetové služby	2 500	2 243	2 500	účelově vázané prostředky	
Jízdné funkcionáři	5 000	0	5 000	fond Tilio	27 392
Přísp. na stravné za schůze	700	0	700	fond ediční	12 660
Muzeum	20 000	2 559	20 000	fond Cigno	21 388
Libroservo nákup zboží	4 000	3 223	19 000	sekce nevidomých	20 279
Libroservo poštovné a balné	300	0	300	klub Mladá Boleslav	16 498
Kurzy esperanta	200	0	200	klub Ratíškovice	8 246
Příspěvky UEA ind. běžný rok		8 657		klub Karlovy Vary	6 847
Příspěvky UEA ind. bud. rok		0		pedagogická komise	6 220
Platby UK v běžném roce		39 072		klub Havířov	2 907
Platby UK na budoucí rok		0		klub Písek	2 673
Platby ILEI a pedagog. komise	900	1 640		klub Česká Lípa	2 215
Kolektivní členství v UEA	1 500	1 556	1 500	klub Benešov	1 557
Kolektivní členství v EEU	1 300	1 312	1 300	klub Tábor	1 314
Blahopřání, kondolence	1 500	1 175	1 500	klub Přerov	1 221
Poplatky	50	0		klub Opava	1 079
Daň z úroku	30	48	40	klub Vítkovice	915
Nový majetek	50 000	1 327	50 000	klub Ústí nad Labem	542
				klub Šumperk	589
				klub Hranice	526
				celkem	135 068
				<i>změna vůči 31.12.2020</i>	<i>956</i>
Výdaje celkem	178 980	165 870	224 040		

Malkaŝa letero de ruslandaj sciencistoj kaj sciencaj publicistoj kontraŭ milito en Ukrainio

La 24-an de februaro 2022

Ni, ruslandaj sciencistoj kaj sciencaj publicistoj, esprimas nian rezolutan proteston kontraŭ armeaj agoj, kiujn ekfaris armitaj fortoj de nia ŝtato sur la teritorio de Ukrainio. Tiu ĉi sorta paŝo kaŭzas grandegajn humanajn viktimojn subfosante fundamentojn de ekzistanta sistemo de internacia sekureco. Por eksplodigo de nova milito en Eŭropo plene responsas Ruslando.

Por tiu ĉi milito ekzistas neniu raciaj senkulpigoj. Provoj uzi la situacion en Donbaso kiel kialon por komenco de arma operacio inspiras nenian konfidon. Oni klare vidas, ke Ukrainio ne endanĝerigas sekurecon de nia lando. Milito kontraŭ ĝi estas maljusta kaj malkaŝe sensenca.

Ukrainio estis kaj restos la ŝtato, kiu al ni estas proksima. En Ukrainio loĝas parencoj, amikoj kaj sciencaj kolegoj de multaj el ni.

Niaj patroj, avoj kaj praaŭoj kune batalis kontraŭ naziismo. Eksplozigo de la milito por profito de geopolitikaj ambicioj de estraro de Ruslanda Federacio, kiun movigas dubindaj histori- amantaj fantazioj estas cinika perfido de ilia memoro.

Ni estimas ukrainian ŝtatecon, kiu konsistas en objektive funkciantaj demokratiaj institucioj. Ni komprenas eŭropan elekton de niaj najbaroj. Ni estas konvinkitaj, ke oni povas pacmaniere solvi ĉiujn problemojn de rilatoj inter niaj ŝtatoj.

Eksplozigitante la militon Ruslando kondamnis sin mem al internacia izo-

leco, al pozicio de eksigita ŝtato. Tio signifas, ke ni, la sciencistoj, nuntempe ne povas normale okupiĝi pri nia laboro: ja farado de sciencaj esploroj estas neimag- ebla sen plenvalora kunlaboro kun kole- goj el multaj ŝtatoj. Izoleco de Ruslando de la mondo signifas kontinuantan kultu- ran kaj teĥnologian degradadon de nia lando, kiu havos neniujn pozitivajn perspektivojn. La milito kontraŭ Ukrai- nio – tio estas la paŝo nenien.

Ni dolorige ekkonscias, ke nia ŝtato kune kun aliaj respublikoj de eksa Sovetunio, kiu decidige kontribuis al venko super naziismo, nuntempe fariĝis kaŭzanto de nova milito sur eŭropa kontinento.

Ni postulas senprokrastan haltigon de ĉiuj militaj agadoj, kiuj celas kontraŭ Ukrainio.

Ni postulas respekton al suvereneco kaj teritoria tuteco de ukrainia ŝtato.

Ni postulas pacon por niaj ŝtatoj.

<https://trv-science.ru/2022/02/we-are-against-war> (la retejo dume forviŝita)

esperantigis O. A. Fischer

Elekto de triono de la akademianoj


La 28an de februaro 2022 finiĝis la elekto de triono de la Akademianoj. Sep Akademianoj ne rekandidatiĝis: Marek Blahuš, Tulio Flores, Harri Laine, Aleksandro Melnikov, Sergio Pokrovskij, Otto Prytz kaj John Wells, plus Gerrit Berveling. Estis elektitaj: Javier Alcalde, Tatjana Auderskaja, Bak Giwan, Hans Becklin, Simon Davies, Mariana Evlogieva, Ruth Keves-Cohen, Anna Löwenstein, Vilhelmo Lutermano, Ahmad Mamdoohi, Mao Zifu, Georgi Mihalkov, Marc van Oostendorp, Tim Owen, Paul Peeraerts, Fernando Pita, Orlando Raola, Nicola Ruggiero, Amri Wandel.

La estraro de la Akademio

S-ino Vlasta Kálalová – "La doktorino el la Domo de Trumpetistoj"

Nekredebla vivrakonto pri la tre kuraĝa kaj heroa ĉeĥa kuracistino

Juneco



Post gimnazia maturekzameno 1924

Vlasta Kálalová naskiĝis la 26-an de oktobro 1896 en sudbohemia vilaĝo Bernartice en instruista familio. Kiam ŝi estis 17-jara, ŝi parolis (krom la gepatra) la anglan, francan, rusan, italan, hispanan, germanan kaj turkan lingvoj.

Por sia studo ŝi elektis medicinan fakultaton de la mondfama Karola Universitato en Prago – kie ŝi studis kirurgion. Ŝi diplomiĝis en 1922 kaj post doktoriĝo dediĉis sin al kirurgia fako. Praktikajn spertoj ŝi sekve akiris en diversaj klinikoj – en Prago, Brno, eĉ ankaŭ en Italio (Bolonjo).

Por plenumi sian revon, ŝi daŭre studis la araban kaj persan lingvojn, abonante turkan medicinan revuon por lerni medicinan terminologion.

La 28-jara d-ino Vlasta menciis antaŭ tiama prezidento T. G. Masaryk sian projekton kaj malfacilaĵojn akiri bezonatajn rimedojn por financi ĝin. La prezidento subtenis ŝian projekton per sufiĉe granda mono.

Vlasta Kálalová forvojaĝis en 1924 en la turkan urbon Konstantinopol kaj komencis laboron en Kliniko de Omar Paŝa, kie ŝi praktikis kirurgion nur kelkajn monatojn.

Poste ŝi daŭrigis al la iraka urbo

Bagdado – la urbo de fabeloj de Mil kaj unu noktoj far granda kalifo Harun ar-Raŝid. Ŝi aĉetis konstruaĵon en la centro de Bagdado nomita Burazanlia, aŭ la Domo de la Trumpetistoj, kie ŝi fondis sanatorion kun dudek litoj kaj sukcese prizorgis ĝin dum preskaŭ sep jaroj.



Kiel kuracistino en Bagdado

Tamen ŝi devis batali kontraŭ tradiciaj antaŭjuĝoj. La islamaj virinoj kaj iliaj viroj preferis morton antaŭ malhonoro, se la virino akceptus medicinan servon de fremda viro. Vlasta, kiel kirurgino, havis tie favoran pozicion, ĉar komprenante tion, vere provizadis al la islamaj virinoj servojn, kiujn neniu el la islamaj viroj rajtis doni al ili.

La unuaj pacientoj en la ĉeĥoslovaka sanatorio estis geislamanoj. D-ino Kálalová devis batali kontraŭ ne nur antaŭjuĝoj sed ankaŭ kontraŭ mezepokaj praktikoj de la lokaj homoj. Precipe ŝijaistoj mem kutime ne faris decidojn sen „ĥira“ (chira), do sen profetaĵo bazita sur Korano.

Unu el la unuaj pacientoj estis knabo piedbatita de ĉevalo. La operacio kaj sekva zorgo estis sukcesa kaj la patro de la knabo – ledovendisto, montris sian filon al ĉiuj siaj klientoj kaj laŭdis la lertan kuracistinon. Ŝi faris ankaŭ plastian operacion de knabino kun fendita lipo, kiun alie atendus certa morto en la ondoj de la rivero Tigriso. Ĉe la unua akuŝo, al kiu ŝi estis vokita, ŝi senprobleme helpis al la novnaskita knabino en la mondon. La rekonstruo de la himeno estis ankaŭ ĉefverko, aprezita antaŭ ĉiuj aliaj, precipe en Oriento.

Doktorino Vlasta Kálalová baldaŭ akiris respekton en vasta ĉirkaŭaĵo. Ŝia reputacio atingis ĝis emiro Faisal la 1-a mem, kaj ŝi baldaŭ kuracadis membrojn de lia reĝa familio.


Geedziĝo kun italo



Geedzoj Giorgio kaj Vlasta di Lotti

Vlasta Kálalová en Irako renkontis italon kun la nomo Giorgio Silvio di Lotti, laboranta ankaŭ en Bagdado. Lia edzino Cleofe tie grave malsaniĝis kaj post longa suferado mortis. Rilato de Giorgio kun Vlasta tial intensiĝis kaj en 1927 ili geedziĝis. Sekve ili havis kune du infanojn - la filon Ratbor (*1928) kaj la filinon Drahomila Lydia (*1931).

Hejmreveno



Ilij infanoj Ratbor kaj Drahomila Lydia

Ne bona sanstato de d-ino di Lotti Kálalová laŭgrade plimalboniĝis. Ambaŭ infanoj ankaŭ bezonis normalan ĉeĥan edukadon. Problemon havis la filo Ratbor – li suferis de evolua difekto, supozeble pro la fakto, ke homoj el lia ĉirkaŭaĵo parolis al li ĝis ses lingvoj ekde infanaĝo. Kiam li komencis lernejon, li komencadis trifoje la unuan klason – sensukcese. Do, dum lia fratino Drahomila komencis lernejon, li rezignis. Poste li komencis lerni metion de ĝardenisto.

La tuta familio di Lotti forlasis en 1933 Orienton kaj revenis al Ĉeĥoslovakio. Prezidento Masaryk pritaksis tre alte laboron de Vlasta di Lotti Kálalová.

Faŝisma ideologio dume senĉese kreskis en Eŭropo – estis sekure nek en Italio, nek plu estis iom post iom sekure ie ajn! Sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio estis establita en 1939 Protektorato de Bohemio kaj Moravio. Vlasta postvivis la okupon dum 1939-1945 kun sia familio en sia naskiĝvilaĝo Bernartice, kie ŝi malfermis privatan medicinan praktikon. Fine venis printempo de 1945 kaj la odoro de siringoj estis flarita el la aero en Bohemio kaj eĉ baldaŭa libereco.

Ĉiuj en suda Bohemio ĝojis kaj en la sekva entuziasmo pro la proksimiĝanta liberiga usona armeo, ili volis kiel eble plej feliĉe bonvenigi liberecon!

Tamen estis la 8-a de majo. Tiun tagon aŭtomobila konvojo de SS-soldatoj retiriĝante okcidenten, pasis tra la vilaĝo. Homoj timis ilin, ĉar oni ĉie aŭdis pafadon.

Loka adoleskanto ankaŭ pafis plurajn fojojn al preterpasanta germana konvojo. Tuj poste li fuĝis. Kredante, ke li estis el la domo de Vlasta, la soldatoj elpelis ĉiujn familianojn kaj la servistinojn en la ĝardenon kaj senhezite ilin pafis. Vlasta restis nur vundita, sed kondukita kvazaŭ morta. Tiun tagon ŝi perdis ĉion. Ŝi havis kvarmembran familion antaŭ momento, kaj subite restis tute sola.



Kiel maljunulino

Post la tragedio, kiam ŝi forlasis la hospitalon, ŝia vivo estis nur "ombro" de la antaŭa, sed ŝi ne rezignis. Ŝi prelegis kaj eklaboris en la kirurgia kliniko en Prago. En la malfruaj 1940-aj jaroj ŝi komencis vojaĝi eksterlanden. Ŝi vizitis sian amikinojn en Usono kaj provis forgesi sian tristan fatalon. Krome, ŝi pligrandigis sian lingvokapablon al dek kvar lingvoj. Sekve ŝi prelegis en Norvegio, Italio kaj Sovetunio, ekzemple. Poste ŝi ankaŭ aktivis hejme,

instruante al infanoj fremdajn lingvojn. En la indiĝena domo ŝi jesis starigi infanĝardenon. Irakon, kie ŝi lasis signifan spuron, ŝi neniam plu vizitis.

La konkludo de la vivo

La komunisma reĝimo ne povis forgesi ŝiajn skribajn protestojn, senditajn en 1950 al tiama prezidento Klement Gottwald kontraŭ la ekzekuto de d-ino Milada Horáková kaj aliaj maljuste akuzitaj.

Kiam d-ino Vlasta di Lotti Kálalová mortis en 1971 en la hospitalo de la sudbohemia urbo Písek, la publiko plejparte eĉ ne sciis ĝis nun pri ŝia ekzisto. Nur la gazeto **Zdravotnické noviny** (Medicina gazeto) registris raporton pri ŝia morto, inkluzive de biografiaj datenoj.

Dum enhospitaligo ŝin vizitis la ĉeĥa verkistino Ilona Borská (1928-2007), kiu ekaŭskultis la rakonton pri la vivo de Vlasta, kaj surbaze de ĝi ŝi verkis rimarkindan biografian romanon „Dok-



torino el la domo de trumpetistoj“. Tiel almenaŭ en formo de literatura verko ŝi starigis monumenton al la virino, kiu en sia junaĝo plenumis la preskaŭ neblan taskon, kaj

finfine la sorto ekludis kun ŝi tiel kruele. La romano jam havas ĝis nun sep eldonojn kaj eĉ kelkajn fremdlingvajn versiojn. Se vi trafos la libron, mi rekomendas al vi, ke vi nepre tralegu ĝin. Vi trovos en ĝi multajn pliajn detalojn – mia skriba kontribuo estas vere tro mallonga.

Josef Kříž

DEKLARO DE LA AFRIKA KOMISIONO DE UEA OKAZE DE LA MONDA TAGO DE LA AFRIKA KAJ AFRIKDEVENA KULTURO

Okaze de la Monda Tago de la Afrika kaj Afrikdevena Kulturo, la 24-an de januaro 2022, la afrikaj esperantistoj pere de la Afrika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio (UEA) deklaras sian senrezervan subtenon al ĉi tiu tago starigita de Unesko en 2019 kaj al ĝiaj celoj, kiuj estas gravaj kaj por Afriko mem kaj por la mondo, kie vivas konsiderinda kvanto da afrikdevenaj homoj.

La temo de ĉi tiu tago estas grava por la tuta mondo, ĉar ĝi volas substreki la homajn valorojn de la afrika kulturo, kiuj povas pozitive efiki ankaŭ ekster nia kontinento. Ni kiel afrikaj esperantistoj kaj aparte kiel Afrika Komisiono de UEA alte taksas tiun agadon kaj provas disvastigi nian afrikan kulturon al la tuta mondo pere de la internacia lingvo Esperanto, kiu mem estas ilo por egalaj rilatoj inter la popoloj de la mondo por atingi interkonatiĝon kaj pacon.

Niaj asocioj, societoj kaj kluboj en preskaŭ ĉiuj landoj de Afriko kunlaboras dum la tuta jaro kun parolantoj de Esperanto en aliaj kontinentoj kaj konstante interŝanĝas ideojn kaj informojn pri afrikaj specifajoj. Afrikaj esperantistoj produktis verkojn, kiuj spegulas la variecon kaj riĉecon de la nuntempa afrika kulturo kaj la problemojn, kiujn ni frontas. Tiuj verkoj atingas homojn en aliaj kontinentoj.

Rimarkindaj estas filmoj en Esperanto kreataj en Afriko, aparte en la Demokratia Respubliko Kongo, pri la tragediaj problemoj ligitaj al milito. Abundas ankaŭ kantoj kaj muzikaĵoj kreitaj de

afrikaj muzikaj grupoj, kiuj iĝas famaj tra la tuta mondo inter parolantoj de la internacia lingvo Esperanto.

Samtempe ni partoprenas la agadojn instigatajn de Unesko pri la grandaj temoj de virina samrajteco kaj de valorigo de la propraj afrikaj lingvoj kaj en ĉi tiu spirito ni alvokas al la popoloj de la mondo interesiĝi pri la lingvo Esperanto, kiu permesas ideo-interŝanĝojn inter egaluloj, kaj pri nia agado por diskonigi pere de ĝi la afrikan kulturon.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

PROGRAMO “NI SEMAS”

“Ni semas” estas programo de UEA, lanĉita en 2015 kiel subvenciprogramo por malgrandaj Esperanto-projektoj. En 2022 ĝia [regularo](#) estis reviziita kaj nun la programo funkcias **sub kunordigo de la Afrika Komisiono de UEA (AK)** kun fokuso al Esperanto-projektoj en Afriko.

La subvencijetoj povas temi pri: Esperanto-kursoj por komencantoj aŭ progresantoj; trejnseminarioj por instruistoj; ekzamenpreparoj kaj ekzamenoj; aperigado de lernolibroj kaj aliaj instrumaterialoj adaptitaj al afrikaj bezonoj (afriklingvaj kaj afrikec-enhavaj); kultura interŝanĝo kun aliaj mondopartoj per Esperanto; financado por sendo de skrib- kaj lern-materialoj por lernantoj; informa agado en superaj lernomedioj; ktp.

Esperantistoj dezirantaj subteni la programon kaj la Esperanto-agadon en Afriko povas fari liberajn donacojn al la Fondaĵo Afriko de UEA:

uea.org/alighoj/donacoj/afriko.

La jubilea renkonto apud Poludnica



Komence de ĉi-januario mi ĝuis partoprenon el la jubilea 40-a renkonto de esperantistoj-vojaĝantoj apud la pinto Poludnica en slovaka Tatry-montaro. Ni loĝis en la vilao Victoria, situanta komence de Jánská dolina en la apudmontara vilaĝo Liptovský Ján, kiu estas fama interalie pro resanigantaj akvofontoj. La renkonton partoprenis kelkdek gesamideanoj el Slovakio, Rusio, Francio kaj Pollando.

Veninte al la Liptov-regiono mi ekĝojis vidante falantan neĝon. Dank' al tio ni ĝuis belan blankan vintron en la montaro. Sabate ni kune supreniris al la neĝkovrita monto Poludnica en Malaltaj Tatroj. Unue ĉiuj grimpantoj renkontiĝis en la valo ĉe la hotelo, kiu portas nomon de la plej alta pinto de tiu-ĉi montaro: Ďumbier. Post pli malpli unu horo de suprenirado ni venis al la kaverno en la monto, ĉe kies muro eblas trovi la eksterordinaran, kremkoloran substancon (slovake: plastický sinter), konatan sub la nomo 'la luna lakto' aŭ 'la lakto de la virgulino Maria', produktatan de kavernaj bakterioj kaj fungoj, kiu havas miraklan sanigantan efikon interalie por

haŭto sed ne nur. Ĝin kreas longaj maldikaj agregaĵoj de kalcito, ĉirkaŭvolvigitaj ĉirkaŭ organikaj fibroj, enhavitaj en ĉi tiu bone solvebla formo de kalcia karbonato. Sciindas, ke dum la dua mondmilito 40 anoj de juda popolo, danke al helpo de bravaj lokanoj de la proksima vilaĝo Závažná Poruba, sukcesis travivi kaŝitaj en la kaverno. Poste ni daŭrigis supreniron al la loko, proksime al la pinto, kie situas la piramido de ŝtonoj kunportitaj de Evojaĝantoj el diversaj partoj de la mondo. Kelkaj decidis veni al la pinto, kio tamen malfacilis pro la vojo parte kovrita de glacio. Bela vintra vetero akompanis nin. Bone videblis neĝkovritaj pintoj de Altaj Tatroj, la lago Liptovská Mara, la montaro de Malgranda kaj Granda Fatra, kaj aliaj pintoj de Malaltaj Tatroj.



La regiono de Liptov estas fama ne nur pro vizitinda montaro sed ankaŭ pro eksterordinaraj kavernoj. Partoprenantoj de la renkonto vizitis apudan kavernon Stanišovská jaskyňa.

Ĉar mi jam vizitis ĝin antaŭe tial mi decidis samtempe esplori la alian kavernon - eksterordinaran Jaskyňa Slobody en la najbara Demänovská valo, kiu verŝajne estas la plej fama en Slovakio. Ni promenis trans longaj koridoroj, supren kaj malsupren. Plaĉis al mi bele lumigitaj rokaj formoj, ekzemple 17 metrojn alta stalaktita kaskado. Sciindas, ke ili kreskas je nur 1 mm dum dek jaroj, do ĝi bezonas cent jarojn por kreski je nur 1 cm! Ĉe la fundo de la kaverno ni preterpasis fluantan riveron de pura akvo kaj kun plezuro ni spiris sanigantan kavernan aeron.



En la vilao ni partoprenis kanto-atelierojn kun akompano de gitaro, ni spektis filmojn pri krozo de samideanoj per boato en la „Liptova maro”, kaj pri pasintjaraj supreniroj de esperantistoj al Poludnica kaj al Gerlach – la plej alta montopinto de Slovakio. Partoprenantoj aŭskultis prelegojn kun lumbildoj pri la kronoj de montoj - balkanaj, polaj kaj de Eŭropunio, krom tio interesan prelegon pri turismo en Siberio kaj Slovakio.

Per filmoj, fotoj kaj rakontoj oni rememoris pri inĝeniero Ján Vajs, iniciatanto kaj ĝisnuna ĉeforganizanto de renkontoj apud Poludnica, kiu estis lia

kormonto. Li estis fervora esperantisto, mondvojaĝanto, montoj-grimpanto, speleologo, aŭtoro de pluraj verkoj, tradukanto, redaktoro de „Esperantisto Slovaka” kaj „Kooperativa Stelo”, kunorganizanto de la unua UK en Slovakio, kiu multe kontribuis al la ideo de Zamenhof sed bedaŭrinde forpasis pasintjare dum la bicikla ekskurso.

Kelkaj bravuloj naĝis en la natura termalfonto (banejo) „Kad’a”, kies akvo sanigas. Plejmulto da partoprenantoj supreniris al apuda ligna vidturo por rigardi ĉirkaŭaĵon de supre, kaj vizitis la subterajn koridorojn, apud historia preĝejo de la 14a jarcento, kie funkcias muzeo pri iama minejo de arĝento kaj pri la vivo de monero. Krom tio oni ĝuis viziton al la moderna muzeo pri naturprotektado kaj kavernoj en la najbara urbeto Liptovský Mikuláš.

Plaĉis al mi tiu renkonto kaj mi bone ripozis. Antaŭ ĉio mi ŝatis promeni vizitante interesajn lokojn kaj renkontiĝi kun samideanoj. Kun plezuro mi gustumis slovakon manĝon, kukojn memfaritajn de slovakaj samideanoj kaj la montaran mieldrinkon. Espereble en estonteco mi povos denove renkontiĝi kun geesperantistoj en la Tetry-montaro kaj mi tutkore rekomendas tion ĉar la loko belas, via sano profitas danke al saniganta akvo, pura aero kaj sportumado kaj plaĉas al mi agrabla etoso de la apudmontaraj renkontoj.



Adam Wilkus Januare, 2022

E-mental' en Bestĝardeno

Antaŭ dudek jaroj membroj de E-mental' decidis subteni zoologian parkon en Prago. Ni volis adopti iun beston, tio signifis donaci monon necesan por ĝia bredado dum unu jaro. Samtempe kun monkolektado ni elektadis konvenan beston. Kompreneble, ke ni tuj volis iun grandan, ĉu leonon, ĉu elefanton, sed ilia bredado kostas dekmilojn da kronoj jare kaj ni komence kolektis monon nur por breĉi unu fantominsekton, kiu kostis kvindek kronojn. Interesa propono estis ankaŭ iu ajn besto, kiu estas videbla de loka gastejo!



Finfine ni kolektis sufiĉe da mono por subteni kelkajn bestojn, kiuj estas iel ligitaj kun fromaĝo: muso, vulpo aŭ korniko. Ĉar sur nomŝildo ĉe ĉiu subtenata besto estis skribite, ke la doninto estas „E-mental' – grupo de frandemaj esperantistoj“, ni subtenis ankaŭ porkon kaj kadavrogrifon.



Dum tempo la praga bestĝardeno ĉesis breĉi kelkajn bestojn kaj komencis breĉi aliajn kaj ni devis niajn bestojn ŝanĝi. La subteno dependas ankaŭ de sumo de kolektita mono. Por la nuna jaro ni adoptas kvin bestojn kaj aliajn kvin ni almenaŭ subtenas, tio signifas, ke ni pagas parton de bredkostoj.



Kiel bonaj gepatroj ni ĉiujare vizitas „niajn“ bestojn por observi, kiel ili prosperas. La aranĝon partoprenas kelkaj dekoj de E-mental' – membroj kaj iliaj amikoj. Integra parto de la renkontiĝo estas jam kelkajn jarojn konkurso de bongustaĵoj, kiujn ĉiu preparas por la aliaj. Post komuna kantado kaj fotado daŭras komuna promeno tra la bestĝardeno kaj vizito de unuopaj bestoj. Sabata programo finiĝas per komuna vespermanĝo. Nunjare ĝi okazis en „Johny pizza bar“, kie estas manĝokarto ricevebla ankaŭ esperantlingve. Kaj dimanĉe ni daŭrigis la aranĝon per boŭla konkurso.





Dum la nunjara renkontiĝo ni kompreneble ne evitis diskuton pri Ukrainio. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ Oli el Ukrainio, membrino de E-mental', kiu longjare vivas en Prago. Surloke ni kolektis entute 5 100 CZK, kiujn ni sendis je konto de karitata organizo.



Ni jam hodiaŭ povas antaŭĝoji la aranĝon Bestĝardeno 2023. Kiu volas partopreni, bonvolu spekti retpaĝaron de E-mental' (www.e-mental.cz).

Jiří Tomeček

Korespondenční kurzy

Loňská konference Českého esperantského svazu v Bartošovicích ve svém usnesení vyzvala výbor k úpravě cen korespondenčních kurzů.

Je třeba si uvědomit, že cena písemných kurzů pořádaných Svazem se více než deset let neměnila. Od té doby se hodně změnilo. Naprostá většina dnešních kurzistů preferuje elektronickou komunikaci a využití České pošty je

výjimka. Jedna listovní zásilka dnes stojí 23,- Kč a to se musí promítnout do cen lekcí zasílaných klasickou poštou.

Současně se zdvihly i ceny elektronických kurzů esperanta pro začátečníky i pokročilé. Cena kurzů totiž není rozhodujícím faktorem při rozhodování o studiu jazyka. Naopak ve srovnání s nabídkou kurzů jiných jazyků nás lehce znevýhodňuje a naše nabídka také vypadá podezřele.

Nově nabízíme zájemcům první lekci kurzu pro začátečníky zdarma včetně konzultace, který kurz si vybrat. ČES nabízí totiž dva kurzy, podle Cinka a podle Marčeka, a zájemce dosud neměl podle čeho se orientovat.

Rovněž se výrazně zvyšuje sleva pro členy Českého esperantského svazu, protože i v našich Stanovách se píše, že jedním z úkolů je zvyšovat a rozšiřovat znalosti členů.

Více informací o nových cenách korespondenčních kurzů najdete na našem webu na adrese:

www.esperanto.cz/cs/jazykove-kurzy/korespondencni-kurzy

ALIĜU AL LA KER-EKZAMENO edukado.net/ekzamenoj/ker/uk.

Dum la sesio okazos la premiero de la nova nivelo C2. Ĉe la paĝo eblas trovi ĉiujn informojn pri la KER-ekzamenoj kaj la aliĝilon por ekzameniĝo dum la 107-a UK (Montrealo, 6-13 aŭgusto 2022). La skriba kaj aŭdkomprena ekzameno okazos ĵaŭdon kaj vendredon. Por la parolaj ekzamenoj (20 – 25 minutoj) oni devos rezervi lokon. La horaro disponeblas en julio ĉe la sama paĝo. Por partopreni la sesion oni devas esti aliĝinta al la 107-a UK:

uea.org/kongresoj/alighilo

GK UEA

Mi petas bieron. Pivo v Masných krámech si objednal v esperantu.



ilustra foto de E-mental

Tian titolon havas artikolo pri nia komitatano Jiří Tomeček, kiu aperis en la retejo iDnes.cz de České Budějovice la 27-an de februaro 2022. La titolo informas, ke li mendis bieron en la gastejo „Viandbutikoj“ esperantlingve.


Redaktoro Josef Musil rakontas pri la esperantista vivo de la geedzoj Mirka kaj Jirka Tomeček, pri iliaj filoj Štěpán kaj Aleš kaj iliaj familioj, pri nia Esperantomuzeo kaj pri Zamenhof.

Legu ĉe <https://1url.cz/LKnRK>

Milada Zemanová en televidaj konkursoj.

Nia nelacigebla membrino Milada Zemanová denove aperis en televida konkurso, ĉi-foje ĉe televido Nova, kie ŝi konkursis kontraŭ „defiantino“. Plie en iu retrokanalo oni ripetis malnovan konkurson de antaŭ dek kvin jaroj, en kiu Milada ankaŭ ne mankis.

Esperanto kaj amikeco



estas titolo de foto-konkurso de ILEI, kiu partoprenis ankaŭ Miloslav Šváček kun foto Adiaŭo.

Kolektado de te-etikedoj

Ĉu vi sciis, ke ekzistas kolektantoj de te-etikedoj? De tiu papereto ĉe la fino de ŝnureto, kiu ebligas eltiri brogitan te-saketon sen tuŝi la varmegan akvon? La plej bonaj kolektantoj en Ĉeĥio havas ĉe pli ol 3000 specojn. La teksto pri tia kolektado estis tradukita al la angla (M. Kalina) kaj al Esperanto (L. Dvořáková).

PRI KER-ekzamenoj

Ĝis nun 2463 homoj sukcesis en la KER-ekzamenoj, kiuj estas servo de UEA kunlabore kun Edukado.net. La ekzamenajn laborojn ekde 2008 gvidas la KER-ekzamena Komisiono de UEA, konsistigita de Katalin Kováts (gvidanto), Zsófia Kóródy kaj Renato Corsetti. La ekzamenoj sekvas la kriteriojn de la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo (ALTE), ĉe kiu Zsófia Kóródy estas UEA-reprezentanto. La ekzamensistemo por la niveloj B1, B2 kaj C1 estis validigita de la ŝtata ekzamencentro ITK (nuntempe ORIGO) de la Universitato Eötvös Loránd de Budapeŝto (Hungario), kiu kunlaboris kun UEA ĝis 2021. Por validigo de la nivelo C2 UEA kunlaboras kun la Akademio de Esperanto: uea.org/gk/1001.

Forpasis Claude Nourmont

(1945-2022)

Claude Nourmont naskiĝis en la franca urbo Rouen la 23-an de oktobro 1945 kaj mortis la 25-an de februaro 2022. Ŝi estis Dumviva Membro de UEA, konstanta Membro de Societo Zamenhof, Honora Prezidanto de TEJO kaj Komitatano de UEA.



Ŝi esperantiĝis en 1963. Ekde tiam ŝi aktivis movade, vizitis Esperanto-renkontiĝojn, organizis kaj laboregis por Esperanto. Inter 1975 ĝis 1977 ŝi estis prezidanto de TEJO. En 1973 ŝi fariĝis ĝenerala sekretario de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE; nun *Espéranto-France*); inter 1994 ĝis 2001 ŝi estis prezidanto de UFE. Ŝi prezidis la Lokan Kongresan Komitaton de Montpellier (UK 1998). Ŝi estis Komitatano de UEA ekde 1986 ĝis 2022 kaj Vicprezidanto de UEA inter 2004 ĝis 2013. Ŝi estis redaktoro de *Monato* (rubriko Arto, 2005-2022), ĉefredaktoro de *Le Monde de l'Espéranto* (2003-2022) kaj konstanta prizorganto de Kleriga Lundo dum la UK.

Ĉiame ŝi restos en nia memoro, kiel tre bonkora persono kun eterna emo kontribui, helpi, animi, pacigi kaj financi. Ŝi estis granda mecenato de Esperanto-agadoj. Kiam aliaj fermis la orelojn, ŝi ofte estis la unua, kiu donacis.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

foto el Vikipedio

Anatolij Gonĉarov forpasis



la 11an de februaro 2022 en Brjansk (Ruslando) pro la koronaviruso. Anatolij Gonĉarov (1940 – 2022) estis Sovetunia kaj Ruslanda kemiisto kaj esperantisto (ekde 1958), instruanto de Esperanto kaj movad-organizanto, fondinto kaj gvidanto de kelkaj Esperanto-kluboj, kunfondinto kaj prezidanto (1966-69, 1972-74) de SEJM, estrarano (1979-89) kaj vicprezidanto (1988-89) de ASE kaj gvidanto de ties scienc-teknika komisiono, vicprezidanto de SEU (1989-90), senatano de la Esperanta Civito (2002-11); aŭtoro de pluraj artikoloj aperintaj en Esperantaj gazetoj, kompilinto de la broŝuro *Esperanto-identeco: citaĵoj kaj komentoj* (2010) kaj de la citaĵaro *Tiu ĉumalofta sufikso -um* (bitlibro, 2021), kuntradukinto de la libro *Defendi la pacon, preventi nuklean militon: Proponoj de Soveta Unio en la Dua Speciala Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN pri malarmado* (1982).

Halina Gorecka

Aleksander Korĵenkov

La Ondo de Esperanto



La 4-an de februaro 2022 forpasis **Ladislav Částečka** (75-jara) el Lipník na Bečvou, lokomotivestro, membro de ĈEA kaj ĈFEA (tute maldekstre).

EL LA ESPERANTISTA MONDO


ALVOKO

BET en KLAIPÉDA

La 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj okazos en la litovia Klaipéda la 9-an – 17-an de julio 2022 okaze de 770-jariĝo de la urbo. Celo estas studi problemojn de Esperanto-movado, interŝanĝi spertojn, perfektigi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon. Informoj ĉe:

www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56

50 jaroj de Juna Amiko



Ni bezonas multajn novajn lernantojn kaj por ili bonkvalitajn kaj konvenajn legaĵojn. Tia estas Juna Amiko, revuo kun varia, aktuala temaro, bunte ilustrita, profesie pretigata de internacia

redakcia teamo. Eldonas ILEI 4-foje jare, liverata perpoŝte aŭ rete. Ĉe ni 350 Kč papera formo, 190 Kč reta formo, vidu p. 30.

Subtenu la revuon per abono!

ELEKTITAJ (SEN BALOTO) 4 KOMITATANOJ B DE UEA: MANDATO 2022-2025

La novaj komitatanoj B estas Aleks Kadar el Francio, Aleksandro Cesário el Brazilo, François Lo Jacomo el Francio kaj James Rezende Piton el Brazilo.

LA 44-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO MONTREALO

estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kaj havos specialan programon por festi la 70-an jariĝon de CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado). La organizantoj invitas ĉiujn fakulojn – aparte junulojn kaj unuafojajn partoprenantojn – sendi proponojn pri 20-minutaj referaĵoj, kiuj povas rilati al CED, interlingvistiko aŭ esperantologio. La proponoj (150 – 200 vortoj) devas esti sendataj al la retadreso de la organizantoj: Guilherme Fians (guilhermefians@gmail.com), Mark Fettes (mtfettes@sfu.ca).

La limdato por proponoj estas la **15-a de aprilo 2022**. uea.org/kongresoj/alighilo.

VORTOJ : UEA PARTNERAS EN NOVA EU-PROJEKTO

La ludo kombinas uzon de ludtapiŝo kaj projekciadon de vortoj. Per paŝoj aŭ saltoj sur la tapiŝo ludantoj devas trafte elekti inter moviĝantaj vortoj laŭ la diversaj proponitaj defioj.

“**Vortoj** estas komputila ludo de reflekso, lingvoj kaj mojoseco! Per **Vortoj** oni praktikos lingvojn kaj plicertiĝos pri literumado de vortoj, amuziĝante dum kursoj kun amikoj kaj kolegoj” www.vortoj.net

Kiel informas Peter Baláž, kunordiganto de E@I, “**Vortoj** estos tre taŭga ilo por neformala edukado kaj ni esperas, ke ĝi ankaŭ trovos sian vojon en la formala eduk-sistemo de diversaj landoj, uzota de instruistoj dum lingvo-lecionoj.



Universala Taksilo de Inda Landa Agado

Celoj de la projekto

- 1) Doni al Landaj Asocioj manierojn taksi siajn laborojn kaj fari komparojn kun aliaj Asocioj.
- 2) Doni al UEA tute novan manieron mezuri la agadojn de siaj Landaj Asocioj
- 3) Doni al UEA bazon per kiu ĝi formulu utilajn strategiojn por la landa agado
- 4) Doni valorajn informojn por la sekva renovigo de la koncerna «Landa Parad'»
- 5) Vastigi kaj profundigi la komprenon de la membroj pri landa agado.
- 6) Levi la tradician meĥanisman por akiri informojn de la Landaj Asocioj.

Demandilo de UTILA (poentoj)

1. Kongresoj kaj kunvenoj

- 1.1 Nia LA organizas naciajn kongresojn 5
- 1.2 Nia LA organizas aliajn kunvenojn por niaj membroj 3
- 1.3 Tiuj kongresoj aŭ kunvenoj havas internacian partoprenon 1
- 1.4 Niaj kongresoj kaj kunvenoj aperas en la Eventa Servo de UEA 1

2. Komunikado kun membroj kaj aliaj

- 2.1 Unu aŭ pluraj vere uzataj ret-grupoj kun fidinda liveranto 4
- 2.2 Unu aŭ pluraj aliaj retaj solvoj por la kontaktado 2
- 2.3 Eldonato de fizika kaj reta eldonaĵoj (revuo) 2
- 2.4 Bona, aktuala retpaĝo por interna komunikado. 2

3. Komunikado kun la ekstera mondo

- 3.1 Aktuala kaj utila nacilingva paĝo pri Esperanto 4
- 3.2 Uzado de socia medio por konigi Esperanton 2
- 3.3 Okazigo de kunvenoj en lernejoj aŭ centroj por prezenti nin 2
- 3.4 Aktiva kontaktado kun ekstermovadaj asocioj kun similideanaj celoj 2

4. Rilatoj kun aliaj Eo-movadoj

- 4.1 Kunlaborado kun ILEI, IKEF, UMEA, LIBE, IFEF aŭ simila 4
- 4.2 Gastigo de tiaj asocioj en viaj kongreso aŭ kunvenoj. 2
- 4.3 Okazigo de kunvenoj en lernejoj aŭ centroj por prezenti nin 2
- 4.4 Aktiva kontaktado kun E-asocioj kun similideanaj celoj 2

UTILA-sumo el 40: ...

Pli detale:

Kongresoj kaj kunvenoj: Daŭro de viaj naciaj kongresoj – Ofteco kaj tipa jar-parto por via kongreso – Tipa nombro de partoprenantoj en viaj kongresoj – Pliaj informoj pri viaj naciaj kongresoj

Komunikado kun membroj kaj aliaj: Via ret-grupo alirebla al ĉiu limigita aliro – Kiujn ilojn de sociaj retoj vi uzas? (Facebook, Instagram, Aliaj) – Kiu respondecas teni vian retpaĝon aktuala? – Bona, aktuala retpaĝo por interna komunikado.

Komunikado kun la ekstera mondo: Retadreso de via nacilingva paĝo pri Esperanto – Pliaj informoj pri la uzado de socia medio – Kunvenoj por la publiko – Kontaktado kun asocioj kun similideanaj celoj

Rilatoj kun alia Eo-movadoj: Kunlaboraj rilatoj – Gastigo de asocioj en via kongreso – Varbado kaj konigo en kunsidoj de partneroj.

Stefan MacGill,
stefan.macgill@gmail.com

Ĉu vi konas Sumoo-legadon?

Ni en Boleslava klubo ŝatas ĝin. Konata japano Hori Jasuo startigis ĝin antaŭ kelkaj jaroj. Esperantistoj el dekoj da landoj en neparaj monatoj legas dum tri semajnoj esperantajn librojn laŭ propra elekto ½ - 3 da paĝoj tage kaj tiel plibonigas siajn lingvokapablon. Jes, *sumo*, japana lukto, postulas penon. Per Sumoo-legado oni batalas kun si mem.




Blanka Hužerová, Mladá Boleslav je la 15-a de decembro 2021.



Ni legis en decembro sukcese „Legaj-ojn“ de nia instruistino kaj gajnis diplomojn. Se plaĉus scii pli, aŭ vi dezirus ankaŭ lukti, ni helpos al vi.

Esperanto por mi

Karaj, ni eldonis la libron konsistantan el portretoj de 16 esperantistoj kun iliaj e-seoj. La portretojn kreis Helga Plotner el Germanio. Ni jam eldonis 3 librojn en tiu serio, do en tiuj 4 libroj aperis 64 esperantistoj. Helga nun portretas por la 5^a libro.



Esperanto por mi n-ro 4 estas 16 esperantistoj portretitaj de Helga (oranĝa kovrilo), A4, 16 paĝoj, kolora. Mi ekspedis 20 ekzemplerojn al UEA, do vi povos mendi ĉe Libroservo

de UEA.

Jenaj homoj aperas en la 4a libro:

1. AIKAWA, Takuya (Japanio)
2. BECKLIN, Hans Eric (Usono)
3. BOYADZHEVA, Eva-Parashkeva (Bulgario)
4. CHRDL, Petro (Ĉeĥio)
5. CHUN, Amira (Koreio)
6. IONESOV, Anatolij I. (Uzbekio)
7. Ĵomart kaj Nataŝa (Ĵ&N) (Svedio)
8. KLAWE, Christoph (Germanio)
9. LAROCA, Maria Nazaré (Brazilo)
10. LE DRU, Elisabeth (Francio)
11. LIANG, Ziming (Ĉinio)
12. RAVELOHARISON, Miora (Madagaskaro)
13. SONG, Ping (Ĉinio)
14. TRINH, Hồng Hạnh (Vjetnamio)
15. TSHAMENA, Aleksandrine Omba (DR Kongo)
16. Galerio de Helga Plötner

HORI Jasuo

371-0825 Japanio, Gunma, Maebaŝi, Ootone 2-13-3, Retadreso:

horizonto@r.water.sannet.ne.jp

Informo pri agado de la E kluboj

Estimataj klubestroj, karaj Esperanto-geamikoj,

mi salutas vin okaze de venantaj printempo kaj ankaŭ espero, ke ĉi-jare finfine iĝos pli bone, pli favore.

De sur tiu ĉi loko mi dankas al vi, klubestroj, kiuj sendis al mi informon pri viaj aktivaĵoj inter la du E konferencoj. Nome mi dankas al la geestroj de kluboj el Mladá Boleslav, Benešov, Praha, Prostějov, Brno, Česká Třebová, Havířov, Poděbrady, Plzeň, Olomouc, Opava, Ratíškovice, Písek, Česká Lípa, al sekcioj IKUE kaj KELI, al pedagogia komisiono kaj al gaja grupo E-mental. Viajn informojn mi transdonos dum la konferenco al la ĉeestantoj kaj kompreneble al la komitato de ĈEA.

Mi estas konvinkita, ke ankaŭ la ceteraj kluboj, kiuj pri si ne informas, laboras bone kaj aktive kaj venontfoje sendos al mi la raporton.

Ĉi jare aŭtune mi denove petos la informon pri via agado – okazos ja kongreso de ĈEA en Pardubice. Mi supozas, ke venos multaj esperantistoj – oni planas interesan programon. Krom traktado de kunsido de anaro okazos elekto de nova komitato de ĈEA. La nuntempa komitato serĉas homojn, kiuj dezirus labori en la nova komitato. Ĉu estas inter ni kapablaj, sindonaj, fidindaj homoj, kiuj daŭrigus en la laboro por Esperanto en nia lando?

La aprila aranĝo en Bartošovice estis bedaŭrinde NULIGITA.

Junie (9.6.2022) okazos soleno de tridekjariĝo de E-eldonejo KAVA-PECH, kie oni inter alie lanĉos la longe atendatan, grandan vortaron Ĉeĥa-Espe-

ranta. La eldonisto, sinjoro Petro Chrdle, meritas nian admiron kaj dankon.

Karaj esperanto-geamikoj, okazos certe ankoraŭ aliaj E-aranĝoj – bonvolu viziti almenaŭ kelkajn, renkontu viajn konatulojn, babilu, ĝuu la agrablan etoson! La organizantoj preparas la renkontiĝojn nur nure pro vi!!!

Telefono Esperanto-info

La telefona numero 774 562 047 funkcias ĉiutage inter 9:00 – 18:00, kie deĵoras Pavel Kašćák (la iniciatinto) aŭ Leonarda Chaloupková kaj donas informojn pri Esperanto. Serĉataj estas pluaj volontuloj.


Lenka Angelová

Estas preskaŭ nekredeble, ke jam pasis unu jaro, kiam forlasis nin nia kara Lenka. Ni deziras sukceson al ŝiaj daŭrigantoj, filo Petro kaj fratino Mirka.

*Leonarda Chaloupková,
komitatanino de ĈEA*

Unu Ŝerco Tage

Michal Lebl michallebl@gmail.com
ilustris Mirka Tomečková



KLUBA VIVO

Brno: La 22-an de februaro 2022 okazis la jarkunveno de Esperantista klubo en Brno. Prezidanto Milan Kolka tralegis raporton pri agado en 2021, Bohumila Trzosová raporton de kasistino.



Klubaj kunvenoj estas marde je la 18-a horo alterne en la klubejo (Hybešova 65a) kaj virtuale. En 2021 la klubo festis sian 120-jariĝon kaj realigis 40 prelegojn kaj adoptis surikatojn kaj agamon en la urba ZOO.

Prostějov: La 3-an de februaro 2022 partoprenis en jarkunveno de EK Prostějov tri membroj. Estis elektita komitato: Jaroslav Liška (prezidanto), Jiřina Budínová (bibliotekisto), Jiří Kincl (kasisto), Jitka Hanáková (reviziisto).



Kunvenoj ĉiun ĵaŭdon je la 16-a horo.

Svitavy: Sabate la 19-an de februaro 2022 okazis jarkunveno de Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy. El 16 membroj venis 11, aliaj senkulpigis sin. Venis ankaŭ Ladislav Kovář el Česká Třebová kiel reprezentanto de IFEF kaj Miroslav Malovec el Brno kiel reprezentanto de ĈEA-komitato. Ĉar estis necese nuligi Marcipanan Kristnaskon pro pandemio, estis decidite fari Marcipanan Paskon la 9-an de aprilo 2022 kaj la 4-an de decembro daŭrigi la tradicion.



Kun Ladislav Kovář la jarkunveno traktis viziton de fervojistoj al la muzeo post la maja IFEF-kongreso en Beroun. Por la 22-a de oktobro estas planata inaŭguro de nova ekspozicio pri fakaj asocioj de UEA. En aŭgusto la klubo intencas veturi al Vroclavo. Oni ankaŭ pripensis organizi sportan konkurson, ekz. ĵetadon de ringoj aŭ pilkoj ne nur por esperantistoj.


Návrhy do výboru svazu

Konference v Bartošovicích v říjnu 2021 zvolila volební komisi pro volby do výboru v roce 2022 ve složení: Vratislav Hirš, Stanislava Nováková, Miroslav Vaněk. Komise na svém zasedání zvolila Vratislava Hirše jako svého předsedu. **Komise vyzývá členy svazu** ke spolupráci při hledání kandidátů na předsedu ČES a další členy výboru. Adresa komise: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz.

Esperanto sonis en la video pri la urbo Hluk

S-ro Lubomír Tomík, poeto, kiu kreis videon pri la fortikaĵo Hluk, pri kiu skribis František Kožík en romano „Super valoj mateniĝas“, alparolis en januaro 2022 la prezidantino de la klubo en Svitavy Libuše Dvořáková, ke ŝi diru kelkajn vortojn en Esperanto.

[Poet Video pro Tebe „Na dolinách svítá.“ - YouTube](#)



Krom Esperanto tie sonas ankaŭ la itala kaj kompreneble la ĉeĥa.

-ld-

Kompakta disko pri František Kožík



La Muzeo pri Moravia Literaturo en Rajhrad post sukcesa ekspozicio pri František Kožík eldonis ankaŭ kompaktan diskon, kiu prezentas liajn vivon kaj verkaron. La disko kostas 50 kronojn.

En ĝi oni trovas liston de liaj verkoj, multajn fotojn kaj ankaŭ artikolojn pri Verda Stacio (M. Malovec), fortikaĵo Hluk, pri diskuto kun Alena Kožíková, filino de la verkisto, kaj multaj aliaj temoj (77 paĝoj).



-mm-

JUBILEANTOJ DE JANUARO, FEBRUARO KAJ MARTO 2022

Jitka Babincová, Turnov
Ladislav Brejcha, Liberec
Ing. Zdeněk Burian, Petřvald
Mgr. Leoš Czafík, Dobříš
Zdeněk Dvořák, České Budějovice
Šárka Hillebrandová, Bratříkov
Pavel Jačka, Kroměříž
Jaroslav Jarolím, Krmelín
Marie Kamenovská, Ratíškovice
Mgr. Mária Kašparů, Rynárec
František Koleňák, Větrní
Mojmír Mackovík, Přerov
RNDr. Anna Madryová, Ostrava
Josef Mendl, Milevsko
Ing. Jiří Pavlát, Třebíč
Eva Pazourková, Pardubice
Stanislav Pech, Zdemslice
Blanka Podvolecká, Hranice
Ján Příborský, Olomouc
PhDr. Ivanka Sečkařová, Třinec
Marek Ševčík, Zlín
Ing. František Trampota, Domašov

*Al ĉiuj jubileantoj ni kore gratulas,
dezirante sanon, ĝojon kaj sukceson en
ilia vivo!*

La 10-a datreveno de la nova Verda Stacio

Verda Stacio havas grandan stokon da programoj en sia arkivo. Vi povas aŭskulti/spekti radio-elsendojn kaj mallongajn filmojn en Esperanto. En periodo de 10 jaroj Verda Stacio kreis 212 filmojn kaj 43 rektajn elsendojn, kiuj troviĝas en Youtube. Inter ili estas raportoj el Universala Kongreso de Esperanto el Nitro (2016) kaj ankaŭ raportoj el Filmfestivalo de mallongaj filmoj el Ĉinio (2015 kaj 2017). Filmpreparantoj de Verda Stacio atingis ankaŭ kelkajn sukcesojn en la kampo de filmo. La plej

valoraj estas unuaj premioj el Filmfestivalo en Ĉinio kaj en la tutlanta ĉeĥa filmkonkurso „České Vize“.

Unue en la EK Ostrava-Vítkovice ni komencis fari la radio-programerojn kaj podkastajn elsendojn. Dank' al dio ni ĉion havas en nia Arkivo – ĉion, ekde la KOMENCO.

Ni intencis festi la datrevenon ankaŭ dum la 7-a Esperanta Lernejo en la kastelo Bartošovice inter la 8-10 aprilo 2022, sed la aranĝo estis NULIGITA.

<https://esperlerni.weebly.com/>.

Samtempe mi dankas al multaj organizaĵoj kun kiuj ni laboris:

Ĉina Radio Internacia Pekino
Radio Muzaiko en Esperanto
Nacia Teatro en Prago
Filmfestivalo Teo kaj Amo el Ĉinio
Studio en Esperanto

*Pavol Kaščák
Verda Stacio*

Pozvánka na Marcipánové Velikonoce



Vzhledem k tomu, že jsme nemohli před Vánoci uskutečnit Marcipánové Vánoce, rozhodli jsme se to dětem vynahradiť před Velikonoce. Opět jsme pozvali manžele Vyšinkovi z Vracova, kteří povedou modelování z marcipánu a nabídnou vám výrobky, na které si sami netroufáte. Modelování se uskuteční v sobotu 9. dubna od 9 hodin v Muzeu esperanta – v Ottendorferově domě za čajovnou. Pro děti máme připravené Pamětní listy a další drobné dárečky. Těší se na vás svitavští esperantisté.

Eli Urbanová (1922-2012)



100 jaroj da ĉeesto, 10 jaroj da sopiro

En 2022 UEA memoras 100 jarojn da ĉeesto kaj sopiras pro 10 jaroj de la forpaso de [Eli Urbanová](#). Ĉeĥa poetino, kiu per multo kontribuis al la Esperanta literaturo, Eli Urbanová naskiĝis la 8-an de februaro 1922, antaŭ 100 jaroj, kaj forpasis la 20-an de januaro 2012, antaŭ 10 jaroj. Ŝi tamen estis tia verkistino, kiu per sia talento poreterne ĉeestos inter ni.

Profesie instruistino, ŝi esperantistiĝis en 1948 kun Ŝtefó Urban, ŝia edzo ĝis 1955 kaj aŭtoro de la versa fablaro [Nova Ezopo](#) (1961). Ambaŭ membriĝis en la Praga Esperanto-Klubo en 1949 kaj baldaŭ ekverkis en Esperanto.

Jam en 1940 Urbanová aperigis poemaron en la ĉeĥa. En la periodo 1952-1957 ŝi ricevis dek premiojn, i.a. la unuan premion pri poezio en la [Belartaj Konkursoj de UEA](#) en 1954. Fortan impulson al Urbanová donis ŝia amikiĝo kun Julio Baghy, kun kiu ŝi ekkorespondis en 1952 kaj kiu vizitis Pragon en 1956. Ŝi aperigis la poemarojn [Nur tri kolorojn](#) (1960), [El subaj fontoj](#) (1981), [Verso kaj larmo](#) (1986), [Vino, viroj kaj kanto](#) (1995), [Peza vino](#) (1996);

dulingva, kun ĉeĥa traduko de J. Rumler), [El mia buduario](#) (2001), [Rapide pasis la temp'](#) (2003) kaj [Prefere ne tro rigardi retro](#) (2007). Ŝiaj poemoj aperis ankaŭ en la kolektoj [Kvarfolio](#) (1976) kaj [Eli Urbanová: nuntempa Esperanta poetino](#) (2005), krom en [Esperanta antologio](#) (1958 kaj 1983). Ŝia literatura ĉefverko tamen estas [Hetajro dancas](#) (1995), ampleksa aŭtobiografia romano, kiu ricevis la OSIEK-premion en 2001. Urbanová multe artikolis pri Esperanto en la ĉeĥa kaj instruis la lingvon.

En 1957 ŝi kunfondis Internacian Verkistan Asocion, kiu funkciis dekon da jaroj. Ĝin sekvis en 1983 Esperantlingva Verkista Asocio, en kiu ŝi ankaŭ membris. De 1975 ĝis 1980 ŝi estis juĝanto pri poezio en la Belartaj Konkursoj. En 2003 OSIEK dediĉis sian konferencon en Prago parte al ŝia verkaro. Ĝia prelegaro, [Intimaj temoj en Esperanto-beletro](#), aperis en 2005. Urbanová estis membro de la Akademio de Esperanto (1986-1995). En 1996 ŝi fariĝis Honora Membro de UEA. Saman distingon ŝi ricevis de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en 1982.

Preskaŭ ĉiuj el ŝiaj verkoj disponeblas en la Libroservo de UEA kontraŭ specialaj prezoj: <https://katalogo.uea.org>. Eli Urbanová estas unu el la Esperanto-verkistoj omaĝataj de UEA en la 135 jaroj de Esperanto #NiaLingvo. La Asocio forte kuraĝigas al ĉiuj akiri la librojn kaj konatiĝi kun tiu, kiu estis giganta virino, pensinta multe pli antaŭen ol ŝia tempo. La teksto de tiu ĉi Gazetara Komunikado baziĝas sur enhavo de la [marta numero de 2012](#) de la revuo *Esperanto*.

Gazetara Komunikado de UEA

Ni kondolencas

Pri forpaso de du membroj ni eksciis nur post unu jaro, tial senkulpigu la malfruiĝon.

■ La 21-an de marto 2021 forpasis s-ro **Václav Němeček** (nask. 1944), teknikisto en Praha.

■ Fine de julio 2021 forpasis en azila domo s-ino **Drahomíra Hlínková**, fraŭline **Chlubnová** (nask. 1928). Ŝi studis ekonomion kaj filozofian fakultaton en Brno.

En en la 1950-aj jaroj ŝi aktivis en junularo Brno, por kies teatra aktivado ŝi esperantigis komedion *La lasta viro* de F. X. Svoboda. Por Junulara kantareto de Josef Cink ŝi esperantigis kanton de Bedřich Smetana *Mia stelo*.

Por ĉeĥa radio ŝi enĉeĥigis el Esperanto teatraĵon *La mondo ne havas atendejon* de nederlanda aŭtoro Maurits Dekker (esperantigis Frits Faulhaber) samtempe kun Tomáš Pumpr. La du ĉeĥaj tradukistoj ne sciis pri si reciproke kaj ne estas klare, kies traduko estis fine elsendita (7.2. kaj 4.5. 1956).

Poste ŝi dediĉis sin al profesia tradukado el la angla en la ĉeĥan. Ni scias pri 32 tradukoj, ekz. el Agata Christie, Arthur Conan Goyle, Buster Keaton (komikisto Frigo), Mario Puzo k.a. (La kompletan liston vi trovos en Vikipedio).

SIMO MILOJEVIĆ FORPISIS



Universala Esperanto-Asocio funebras sian eksan Ĝeneralan Direktoron Simo Milojević, kiu forpasis la 3-an de februaro 2022 en la aĝo de 85 jaroj en Trebinje

(Respubliko Serba, Bosnio kaj Hercegovino). Li naskiĝis la 14-an de decembro 1936 en Kunja Glavica, Trebinje. Milojević studis komparan literaturon en Beogrado kaj fariĝis ĵurnalisto.

Li esperantistiĝis fine de 1956. Sian “Esperanto-karieron” li ekis kiel surloka aganto. Poste li fariĝis sekretario de Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio kaj de Jugoslavia Esperanto-Instituto. En 1963 li estis ĉefredaktoro de "Jugoslavia esperantisto", poste de "La suda stelo" (1964, 1967-69). Kiel komisiito de UEA li restadis pli ol jaron (1960-61) en Hinda Unio kaj Nepalo por instrui Esperanton.

Milojević redaktis la revuon "Kontakto" (1970-74). Li eklaboris en la Centra Oficejo komence de 1974. Inter 1974 ĝis 1980 li estis vicdirektoro; inter 1974 ĝis 1984 redaktoro de "Esperanto". Li fariĝis Ĝenerala Direktoro de UEA en 1983, posteno, kiun li okupis ĝis 1995. Li estis membro de la Akademio de Esperanto (1989-1998). En sia 60-a vivojaro, do en 1996, li decidis formeti ĉiujn movadajn funkciojn kaj laboris kiel libroservisto kaj bibliotekisto en UEA. Dum tri jardekoj, li estis unu el la ĉefaj motoroj de UEA kaj Universalaj Kongresoj. Li pensiĝis fine de 2002. En 2006 li ricevis la “esperantistan pacpremion” Deguĉi. Li translokiĝis al Trebinje en 2007. En 2008 la Komitato de UEA, dum la UK en Roterdamo, elektis s-ron Simo Milojević kiel Honoran Membron de UEA.

UEA perdas eminentan Esperantiston, CO-kunlaborantoj ankaŭ bonan kolegon kaj amikon.


*Gazetaraj komunikoj de UEA,
n-ro 1015*

Miaj prizonoj mia granda ŝanco!



Adem Demaçi (1936-2018) estis kosova verkisto, kiu pasigis plurajn jarojn en prizono, tie meditis pri la senco de la vivo kaj tial li sentis la prizonadon kiel grandan donacon. Verkis pri tio artikolon, kiun esperantigis Bardhyl Adem Selimi, kaj per Esperanto ĝi estis tradukita al multaj aliaj lingvoj. La 33 lingvaj versioj aperis en unu libro. Inter ili estas ankaŭ la ĉeĥa versio de M. Malovec (*Má vězení – moje velká šance!*) kaj slovaka versio de Jano Vajs (*Moje väzenie – moje veľké šťastie!*), certe unu el liaj lastaj laboroj.


La Vojo – Put'



Konata rusa esperantisto Mikaelo Bronŝtejn eldonis spegule Esperantan-rusan libron **La vojo – Put'** pri originala Esperanta poezio kun rusaj tradukoj. Aperis tie ankaŭ poemo de slovaka esperantistino vivanta en Jihlava **Mária Pilková**, nome **Vi diras – Ты говоришь**. Entute 96 poemoj de 44 aŭtoroj, kun paralela traduko en la rusan. Antaŭparolo de Valentin Melnikov.

Senpage elŝutebla

En la esperantlingva parto de la retejo de la eldonejo KAVA-PECH aperis unua senpage elŝutebla libro, nome *Gramatiko de la ĉeĥa lingvo* de Miroslav Malovec, kiu unuafoje aperis en 1995 por la kongresanoj de UK Praha 1996.



<https://kava-pech.cz/esperanto>

Nun ĝi estas destinita ĉefe por eksterlandaj uzantoj de Granda ĉeĥa-esperanta vortaro, kiu nun estas preparata.

Laste aperis

En la revuo *Esperanto* pli malpli regule aperas rubriko *Laste aperis*, kiu prezentas novajn librojn aperintaj tra Esperantujo. Ni menciuj kelkajn interesajn de lastaj monatoj:

Jules Verne: **Vojaĝo al la Centro de la Tero**. Trad. Hu Sheng-hao.

Stanislaw Lem: **Solaris**. Trad. P. Wierzbowski.

Fatos Kongoli: **La Perdinto**. Trad. T. Chmielik, B. Selimi el la albana.

Gabriela Zapolska: **La Moralo de sinjorino Dulska**. Trad. T. Chmielik, L. Ligęza.

Julian Modest: **La fera birdo**. Originalaj rakontoj.

Samuel Beckett: **Finalo de partio**. Teatraĵo.

Omaĝe al Lorca. Trad. M. Fernández kaj F. de Diego el la verkoj de F. G. Lorca.

A.A.Milne: **La Domo ĉe Pu-Angulo**. Tr. E.G. Evans. Daŭrigo de Winnie-la-Pu.

Pawel Kowalczyk: **Ruĝaj vojoj de Aŭrovido**. Spertoj de pola volontulo en hindia eksperimenta urbo.

Marta Altés: **Novulo en la urbo**. Trad. T. Owen. Hundo perdiĝinta en nekonata urbo.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:

(ukončení variabilního symbolu)

- 06940** členství ČES
- 06941** členství UEA
- 06942** předplatné Starta bez členství
- 06943** dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944** poplatek UK
- 06945** kongres EEU
- 50400** komise pedagogická ILEI
- 50401** písemný kurs začátečníci
- 50402** písemný kurs pokročilí
- 50404** Paroliga kurso
- 50405** svazové zkoušky
- 50800** sekce nevidomých LIBE
- 50900** sekce zdravotníků UMEA
- 51000** sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100** sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200** sekce informatiky
- 70100** komise pro tisk a inf.
- 80200** ediční fond
- 80300** propagace v tisku
- 80400** fond Tilio
- 80500** virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto aperas dumaniere: (1) kiel ĉiutage ĝisdatigata novaĵretejo (<https://sezonoj.ru/>), kaj (2) kiel ĉiusezona almanako (kun literatura suplemento jarfine), kiu enhavas la plej gravajn tekstojn el la novaĵretejo kaj krome artikolojn, eseojn kaj beletraĵojn, verkitajn speciale por la almanako, kiu konservis la nomon "La Ondo de Esperanto". La novaĵretejo ekzistas danke al la donacoj kaj abonoj al la almanako "La Ondo de Esperanto". Malkiel la novaĵretejo, kiu estas libere legebla de ĉiu deziranto, la almanako estas legebla nur de tiuj, kiuj abonas ĝin.

Estas tri abonkategorioj:

- 1. Abonanto – 400 Kč**
- 2. Amiko – 800 Kč**
- 3. Patrono – 2600 Kč**

Časopisy a knihy na internetu

Časopisy a knihy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitgazetoj.html>

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html>

Internetový kurz esperanta, třeba pro ty, kteří si chtějí oprášit své znalosti

<https://lernu.net/cs>

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
53. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč
Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117
Uzávěrka příštího čísla: 7.5.2022

Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 53-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
<http://www.esperanto.cz/starto>

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 7.5.2022

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.

KALENDARO

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

Ĉiun duan mardon virtualaj kunvenoj de E-
Klubo en Brno - gastoj bonvenas!
Fizikaj renkontoj en Hybešova 65a alternas kun
la virtualaj. <http://esperantobrna.cz>
info: brno@esperanto.cz

2022-04-8/10 Esperanto-lernejo Bartošovice
Info: NULIGITA

2022-05-6/11 73-a IFEF-kongreso en Beroun
Info: kongreso@atlas.cz

2022-06-09 30 jaroj de KAVA-PECH, JTP
Senovážné nám. 23, info: chrdle@kava-pech.cz

2022-07-17/30 Unua etapo de SET Lančov

2022-07-31/-08-12 Dua etapo de SET Lančov

2022-08-12/14 Renkontiĝo de ekstendaranoj
info: let.lancov@seznam.cz

2022-09-16/18 ĈEA-kongreso en Pardubice

2022-10-07 150 jaroj de F.V. Lorenc en Vrdy

2022-10-22/24 Inaŭguro de ekspozicio en
Svitavy pri fakaj asocioj de UEA

2022-11-12/13 120 jaroj EK Praha

2022-12-04 Marcipana Kristnasko

2022-08-06/13 Universala Kongreso en
Montrealo



2022-10-13/16 KAEST

2023

2023-09-15/17 ĈEA-konferenco en Strážnice



40. ročník výstupu esperantistov na Poludnicu dňa 08. 01. 2022

Januara Poludnica omaĝe al Jano Vajs



Jarkunveno en Svitavy



Jarkunveno en Brno

E-mental en bestĝardeno